10-a JARO, N-o 412 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. DECEMBRO 1933.

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 23, rue Boyer, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris: Bruxelles n-o 358 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Leipzig n-o 85 148, Paris n-o 1234 22, Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT, bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « L. Bannier ».

VALENCIO

la Urbo de nia XIVa Kongreso

La vorto Valencio estas komuna nomo por la urbo k regiono aŭ antikva regno konsistiginta, kune kun Katalunio, Aragonio k Maljorko, la Aragonan Konfederacion. En ĉi tiu regiono estas du oficialaj lingvoj : la hispana k la valencia, ĉi lasta tre simila k parenca al la kataluna lingvo.

Valencio, kun duonmiliona loĝantaro, estas prospera k bone prilaborita ĉefurbo, kiun ĉirkaŭas multaj industriaj k terkulturaj urbetoj, el kies havenoj eliras ĉiutage grandaj oranĝoŝarĝitaj ŝipoj rekte al nordaj landoj. Sur Valenciaj stratoj estas ofte renkonteblaj la tipaj plugistoj kun siaj nigraj kiteloj k tolaj ŝuoj. La urbloĝanoj vestas sin, kompreneble, laŭ moderna modo. Ĝenerale la unuj k la aliaj estas diskretaj, saĝaj k simpatiaj.

Prave aŭ malprave oni emas kompari la Valencianojn kun Vienanoj rilate la gajon, festemon k artemon de ambaŭ popoloj tiel malproksimaj materie unu de la alia.

En ĉi tiu regiono la klimato estas tre seka k sekve la akvo treege ŝatata, precipe en la kamparo. Por solvi la konfliktojn pri irigacio, ekzistas t.n. « Akva Tribunalo » *(Tribunal de les Aigües)* unika en la mondo laŭ sia speco, pro kio ĝi fariĝis tre mondfama. Ĉi tiu arabdevena juĝistaro el plugistoj, kiu kunsidas ĉiujaŭde surstrate apud katedrala pordo k nur interparolas valencilingve, juĝas senpapere, senskribe k ĝiaj decidoj estas respektegataj k ĝiaj monpunoj tuj pagataj.

Valencio estas ankaŭ turista loko. Ĝi enhavas gotikajn mirindaĵojn kiel « Palaco de la Ĝeneraleco » (Palacio de la Generalidad), mezepoka parlamento, turo « El Miguelete », du grandaj k belaj urbpordegoj k la Grenborso (La Lonja), ŝtona juvelo, en kies impona kolonara salonego eble okazos la Malferma Kunsido de nia Kongreso.

Ankaŭ ekzistas en la urbo grandaj k antikvaj palacoj k monumentoj. Rimarkinda estas la fasado de « Palaco de la Markizo de Du Akvoj » *(Marqués de Dos Aguas)*.



La urbo enhavas ankaŭ bonegajn hotelojn kun tre malkaraj prezoj. En tre bonaj k komfortaj hoteloj kompleta gastigado kostas 10-12 pesetojn. En pli modestaj nur 5-6 pesetojn. La kongresanoj certe ne forgesos peti manĝi la famkonatan « Valencian paston » (*Paella Valenciana*), plej bongusta manĝaĵo por ĉies palatoj.

Apud Valencio kuŝas fama urbeto *Manises* kun siaj 120 fabrikoj de ceramiko (tamen nuntempe pro la krizo senlaboras plejparto el ili). Sed precipe vizitinda estas la senkompara Valencia kamparo, mirinda tapiŝo kun ĉiuj nuancoj el verdo, sur kiu kontrastas la ĉie dissemitaj blankaj makuloj de la kamparanaj dometoj (la tipaj barakoj), ĉio sub hela k pura lazuro. Tre vasta flora, frukta k legoma ĝardenego, tra kiu eble la Organiza Kongresa Komitato aranĝos peraŭtobusan ekskurson.

Krom ĉio ĉi Valencio estas malkvieta k sprita urbo, vibranta unusone kun la aktuala momento, kio facile estas konstatebla per ĝiaj gravaj ĉiutagaj ĵurnaloj k per ĝiaj multnombraj klerigaj institucioj.

Ĉi tie naskiĝis mondfamiĝintaj homoj kiel *Blasko Ibanez*, *Sorolla*, *Benlliure*, *Luis Vives* k.a. Sekve de tio, Valencio estas ne nur la « urbo de la floroj », kiel kantadas la poetoj. Pri tiu ĉi urbo oni diras, ke ĝi estas multfaceta. Ekzistas la Valencio araba, kelta, ibera, prahistoria; la Valencio de la artaj fajraĵoj, de la akraj koloroj, de la belaj kulturitaj kampoj, de la gajaj kavalkadoj ; la Valencio de la ĝojo, de la sinforgeso, de la amebrio... Kaj paralele kun ĉi tiu Valencio ekzistas la Valencio mistika, konscia, proleta, ruĝa, simplanima, oferema, de subtila spirito, de delikataj nuancoj ; la Valencio de la metiistoj, de la korporacioj, de la monforĝantaj laboristoj... Du urboj : Antikvo k Moderno. Du epokoj : Novo k Malnovo : Mallarĝaj stratetoj. Longaj avenuoj. Pasinto k Estonto. — Pasinto : moroj, tradicioj — ŝtono. Estonto : simetrio, asfalto — Cemento...

R. Kiles.

La burĝa esperantismo sen kompaso

Kiu ankoraŭ bezonas pruvon pri la foresto de gvida idealo en la burĝa esp. movado, tiu estos informata per la diskuto iniciatita de s-ro R. Rakuŝa, k ties artikolo « Nova ideologio k nova vojo » aperinta en « La Suda Stelo », organo de la jugoslavaj esperantistoj. Vidante la renovigon de freneza naciismo, kiu infektas rapidege ĉiam pli vastajn rondojn k konstatinte, ke en tia medio la mola k sentimentala burĝa homaranismo ne plu havas firmajn radikojn k sekve ne plu taŭgas kiel afiŝo antaŭ la esperanto-butiko, la unuaj burĝaj esp-istoj aŭdigas sian avertantan voĉon, ke, « komprenante la signojn de l'epoko », oni devas « konstrui la esp. movadon sur la naciismo, kiu estas la kerno de la nuntempa ideologio ». S-ro Rakuŝa pravigas tiun ĉi renverson de la ĝisnuna « ideologio», — se oni fakte povas nomi ĉi tiun ĥaoson da opinioj tia — per la sobra k senkomenta konstato, ke « la kerno de la 19-a-jarcenta ideologio, la kredo al racio k intelekto, la kredo al homaro k utilo de la raciigo fiaskis... »

Tiu ĉi kapitulaco de la burĝaj esp-istoj antaŭ la faŝismo, kiun difinas « Heroldo de Esperanto » *progresema reakcio*, estas tipe etburĝa, ĉar ĝi montras la tutan gradon da seriozo de iliaj idealoj, kiujn ili ĵetas en la rubujon, kiam la « epoko » estas al ili kontraŭa. Honteme ili metas la zamenhofan buston en apudĉambron k neas, kiel Petro la interkonatecon kun Jesuo, la spiritan infanon adoptitan k ĝis nun kun mola koro flegitan. Kontraŭbatali la impertinentan provon de aro da banditoj, de seksaj perversuloj k profesiaj murdistoj, konkeri la estrecon en granda popola ŝtatorganizo, tiu ĉi ideo ne naskiĝas en tiuj ĉi kapoj, aŭ se ĝi frapas la konsciencon de kelkaj individuoj, tiam ĝi ne renkontas la reagantan volon, kiu efektivigu ĝin. Tio estas nia riproĉo al tiuj, kiuj sincere alcelas pli justan k pli homindan socion, kvankam ne sciante la vojon nek konante pli profunde la kondiĉojn de tia socio. La loko de tiaj personoj ne estas en la organizoj, kiuj oportunece adaptas sian movadon al la hazarde regantaj cirkonstancoj, sed pli vere en tiuj organizoj, kiuj senŝanceliĝe sekvas sian idealon rekonitan kiel ĝusta k fonditan ne sur arbitra elpensaĵo, sed sur firma racia esplorado.

La esp. movado bazita sur naciismo entenas neforigeblan kontraŭdiron. La naciismo postulas glorigon de la propra popolo, de la propra lingvo, k konsekvence devas rigardi la aliajn popolojn kiel malpli valorajn. La naciismo tendencas la aŭtarkion, t.e. ĝi sekvas la principon kontentigi ĉiujn bezonojn per propraj rimedoj k eĉ instigas la ŝtatanojn pasigi la libertempon en la propra lando. La popolo havos malpli da okazoj serĉi personan kontakton — eĉ ne volas ! — kun alilandaj individuoj. La solaj personoj agantaj internacie estos la ŝtatgvidantoj, kiuj, dank' al sia edukado k sia klasaneco, ne bezonas esperanton por la interkompreniĝo. Naciistoj ne interesiĝas pri internacia lingvo, sed pri disvastigo de la propra nacia lingvo. Kiam la naciisma spirito naskiĝas, tiam mortas la kulturo, malaperas la veraj valoroj k sin kaŝas la lumo de la racio. Tiam malprogresos ne nur esperanto, sed ĉiuj konkeraĵoj de la homa racio, tiam velkos ĉiuj floroj de la arto k scienco. La naciismo estas pesto, kiu kripligas la homaron k detruas la ĝermojn de pli bela kulturo, ĝi interfremdigas la homojn k finiĝos nepre per milita katastrofo detruonta la lastajn interligojn laŭrajtajn inter la popoloj.

La veraj pioniroj de internacia lingvo povas esti nur tiuj, kiuj laboras pri nova konstitucio de la homa socio, bazita sur principoj kontraŭaj al naciismo. La fortoj agantaj en tiu direkto troviĝas en la laborula klaso, en tiu klaso, kies anoj suferas la saman sorton inter ĉiuj landlimoj. Tiu klaso bezonas por la nuna tempo la internacian lingvon kiel batalilon, kiu helpas al unuigo de la tutmondaj proletaroj, k poste, foriginte tiun socion estratan parte de banditoj tiu sama lingvo servos por la paca evoluo de la sennacia spiritostato. Tio estas la neŝanĝebla kompaso de la proleta esperanto-movado, la firma poluso, laŭ kiu nia movado sin orientas. La naciisma ventego ne trovu nin rezigne kliniĝintaj. Ĝi instigu nin al pli fortaj streĉoj celantaj forŝiri el la faŭko de tiu monstro la senkritikajn k facil-kredemajn viktimojn, tiujn, kiuj laŭ sia vera karaktero ne apartenas al la reprezentantoj de la naciista kliko[1] profitanta el la eterna disigo de la popoloj.

Al la burĝaj esp-istoj ni diru: Ne kredu, ke vi savos esperanton en la faŝistiĝintaj ŝtatoj per humila adapto de via ideologio al tiu de la naciistoj ! En nia epoko de pliakriĝo de la klasantagonismoj la maskoj ne plu valoras. La frontoj estas klaraj : Por aŭ kontraŭ la sennacieca moralo, por aŭ kontraŭ la senklasa socio, k tio signifas : por aŭ kontraŭ la instalo de internacia lingvo.

Nur socio, ordigita k aranĝita laŭ principoj de l'rajto, ekkoneblaj por ĉiu racia individuo, estos la fekunda grundo por la ĝeneraligo k oficialigo de esperanto. Barbara kulturŝtupo neniam permesos la enkondukon de internacia lingvo, ĉar la neceso evidente ne ekzistas. Ni ne bezonas espon por propagandi naciismon al alilanduloj. Ni ne bezonas ĝin por disvastigi mensogajn militraportojn en kontraŭulaj landoj. Ĝi estu unu el la rimedoj por garantii la pacon k por profunde enradikigi la spiriton de frateco k egaleco en la homaro. Tiel ni faros la « salton en la liberon », tiel ni preparos la grundon por apenaŭ konceptebla kulturo estonta.

Herman Platiel.

[1] Grupaĉo.

Bilanco pri la XIII-a Kongreso de SAT

Enspezoj.

1. *Eksteraj aranĝoj*	sv. kronoj
Subvencio de sv. fakorganizoj	2.785.—
Solena malfermo	144.—
Ekskurso al Gustafsberg	6.—
Sumo	2.935.—

Elspezoj

Interkonatiĝa vespero	808.—
Enirpago Skansen	193.55
Solena malfermo	1.155.26
Gustafsberg	317.—
Diversaĵoj	47.10
Superresto	414.09
Sumo	2.935.—

2. *Kongresaj aferoj*

Enspezoj

Kotizo de anoj	853.48
Kotizo de gastoj	1.395.—
Venditaj sigelmarkoj	143.75
Gajno je literatur-vendo	247.52
Diversaĵoj	75.75
Sumo	2.715.50

Elspezoj

	sv. kronoj
Luo de kongresejo	835.—
Kongres-insigno	210.—
Presaĵoj (sigelm., gvidlibro, programo k.a.)	450.—
Labormat. (papero, kovertoj)	73.15
Afrankoj	113.97
Rekompenco al 3 K-doj por perdita labortempo	150.—
Diversaĵoj	54.11
Superresto	829.27
Sumo	2.715.50

3. *Bilanco ĉe la Admin. de SAT*

Enspezoj:	Kotizoj k donacoj	fr. fr. 815.75
Elspezoj:	Preso de aliĝiloj	fr. fr. 253.20
	Saldo	fr. fr. 562.55

La tuta superresto estas sv. kronoj 1.243.36 + fr. fr. 562.55. Tiun monon oni dividis tiel, ke SAT ricevis sv. kr. 900.— + fr. fr. 562.55, k SLEA sv. kr. 343.36.

Kontrolita, Stokholmo, la 31-an de oktobro 1933.

K. E. Eriksson (16 951) *Arne Jonsson* (16 949)

Reviziantoj de Sveda Laborista Esperanto-Asocio.

Stokholmo, la 22-an de oktobro 1933.

Por O.K.K.

Ernst Eriksson Prezidanto · *Hj. Olsson* Kasisto.

Danke kvitancante la ricevon de la monsumo asignita al nia Asocio, ni komunikas, ke tiu sumo parte utilis por la presigo de la Kongresprotokolaro kiel suplemento al « S-ulo » n-o 409, parte utilos kiel helpo por eldono de la nova Jarlibro. (SAT.)

Komuniko de la Direkcio

Jam en la raporto al la XIII-a Kongreso estis konstatata la neceso baldaŭ realigi la duan eldonon de la « Plena Vortaro ». Ni konscias, ke plia prokrastado malutilus al la reputacio de SAT, dum ĝia aperigo donas konsiderindan moralan profiton al ĝi. Sed SAT mem ne havas la necesan kapitalon ; eĉ ĝi ŝuldas ankoraŭ 11.307.50 *frankojn al la aŭtoroj. Tamen, la unua eldono en si mem ne estis deficita, male, ĝi grave subtenis la financojn de la organizo.*

Se ni tamen donos baldaŭ al la presisto la manuskripton por la dua eldono, tio okazas pro ia speciala aranĝo k ĉar la malavara pruntado de kelkaj personoj k ankaŭ la konkreta helpo de iuj LEA-oj, kiuj antaŭmendis page sufiĉe grandan kvanton, garantias la pagon de l'preskostoj.

La teknika gvidado pri la verko kuŝas en la manoj de K-do Lanti, kiel por la unua eldono. K-do Banmer zorgos pri la administracia flanko: rilatoj kun la presisto, kolekto de mendoj, ekspedo ktp.

PENSU PRI LA KOTIZO!

(Sugestoj ĝustatempaj)

1. **Venis la momento por renovigi membrecon k abonojn.**
2. **La Tarifo troviĝas en viaj manoj.**
3. **Ne prokrastu la repagon, por eviti interrompon de via membreco k en la ricevadode la gazeto k de la Jarlibro.**
4. **Abonu laŭeble ambaŭ revuojn; vi tiele ricevados ĉiu-duonmonate esperantan legaĵon.**
5. **Memoru ankaŭ, ke varbado de novuloj estas plej facila ĉe la komenco de jaro.**
6. **Ankaŭ ekzistas multaj malnovuloj, kiuj seninteresiĝis ; necesas ilin veki k revarmigi por nia afero : admonu ilin !**
7. **Postulu aliĝilojn ! Liveru adresojn de abonigebluloj, al kiuj ni sendos specimenon.**
8. **Resume : estu akurata por vi mem k estu aktiva en via medio (grupo— kurso ktp)...**
9. **?!**

SVISAJ K-DOJ !

La numero de via poŝtĉeka konto estas tiu, citita sub la titolo de la gazeto k ne tiu, malĝuste presita sur la verda Tarif-folio, t. e. la n-o Zürich VIII-200 49 estas ĝusta (VII estas erara !)

Ĵus antaŭ la ekprese de ĉi tiu n-ro ni estas informitaj pri la morto de **S-ro prof. E. GROSJEAN-MEAUPIN,** direktoro de la sekcio "Komuna Vortaro" ĉe la Esperantista Akademio k unu el la aŭtoroj de la "Plena Vortaro" aperinta ĉe SAT. Nekrologa artikoleto aperos en la venonta numero.

El niaj Leteroj

...eno (Hitlerio), 30. nov. 1933.

Komence de marto oni malpermesis al nia SEA[1]-grupo (samtempe al la diversaj lab. junularorganizoj) daŭrigi la kursojn k kunvenojn en la urba junulara hejmo. Sekvis fine de marto la memlikvido de SEA. Mi sciigis tion al la polica prezidanto.



La bela, kvarkolora murafiŝo de nia XIV-a Kongreso. (Havebla ĉe la O.K K. kontraŭ unu respondkupono post 2 semajnoj).

Tamen mi ricevis en aprilo (ankaŭ la aliaj lab. junular-organizoj) polican dekreton, ordonantan, tuj likvidi nian (jam ne plu ekzistantan) SEA-grupon. Tiam jam multaj el miaj gekursanoj troviĝis ĉe la « libervola » laborservo. La reston de miaj Gek-doj (12) mi kolektis k daŭrigis la kurson en iu privata loĝejo. Neĝenate mi ĉiusemajne kunvenis ĝis komence de aŭgusto, kiam ni estis denuncitaj de domloĝantino ĉe la polico. En la koncerna kursvespero sonis subite la sonorilo (estis la 22-a horo) k eniris unu ordinara policisto, du kriminalpolicistoj k 2 « nazi » oj (S. S.[2]-viroj). Ili komencis traserĉi nin (ni estis 9 Gek-doj) ; tio daŭris 1½ horon ; ili traserĉis ankaŭ la tutan loĝejon, sed trovis nenian « ŝtatdanĝerigan » materialon (krom unu SEA-kantaro). Ni ja ne estis stultaj, ke ni kunportis la korespondaĵojn, SAT-gazetojn ktp. Tion ni faris dimanĉe dum niaj ekskursoj.

La sekvintan kursvesperon la kvin sinjoroj ree « ĝojigis » nin per sia vizito ; sed laŭ ilia diro nur por kontroli, ĉu ni daŭrigas la kurson k ne havas timon. Por eviti pluajn el tiuj « agrablaj » vizitoj, mi nun interrompis la kurson k sendis al la polica prezidanto skribaĵon, petante la polican permeson por gvidi privatajn esp. kursojn. La polica prezidanto kredeble ne estis kompetenta, li transdonis mian proponon al la urba lernejkonsilanto. Tiu sendis al mi jenan respondon : « La propono estas malakceptita pro objektivaj (!) motivoj. Vi havas la rajton protesti kontraŭ tiu ĉi decido ĉe la gubernia prezidanto en A... » Sed mi ne protestis pro certa malsukceso. Intertempe mia rondo malgrandiĝis, ĉar kelkaj Gek-doj flanke de la laboroficejo estis ekspeditaj al la provinco Orienta Prusio, kie ili nun devas labori en la tielnomata « kampara helpo ». Pro tio mi ankoraŭ ne daŭrigas la kurson, sed mi esperas, komence de la nova jaro trovi konvenan loĝejon por daŭrigi mian privatan kurson.

Iu *SAT-ano.*

...(Hitl.), 22. nov. 1933.

La nacisocialista partio asertas, ke la baloto de la 12-a de novembro estis la plej libera en la tuta mondo. Nu, pri la termino « libera » oni povas havi diferencan komprenon ! En la plej multaj elektodistriktoj, kiujn mi konas, k speciale en tiu, kie mi voĉdonis, la libero estis tia : La elektonto ricevis voĉdonilon por la plebiscito k tian por la parlamento. La balothelpantoj prezentis al ĉiu krajonon k diris : Ĉiu germano voĉdonu publike per « jes ». Kiu ne voĉdonos per « jes » aŭ iros post la kulison (tiuj estis muntitaj en la elektejoj), povas esti nur perfidulo. Spite tio la plej kuraĝaj iris post la kulison. En multaj elektejoj ne estis muntitaj kulisoj, aŭ nacisocialistoj staris antaŭ ili k observis la balotontojn. Post la voĉdono ĉiu ricevis ordenon kun surskribo JA (alia signifo : I-A = azenbleko). Lastsemajne oni venigis el la loĝejo tiujn, kiujn oni supozis perfiduloj k kondukis ilin tra la urbo. Oni pendigis sur ilin afiŝojn kun surskriboj : « Mi estas perfidulo » aŭ « Mi trompis miajn infanojn », ks. Kie staris pluraj personoj, oni haltigis la kondukatojn k ĉiu el ili devis diri tion, kion subdiris la kondukanto. Mia amiko ankaŭ ĉeestis, k li ĉiam devis diri :

[1] Socialista Esperanto-Asocio.
[2] Milicanoj.

« Mi trompis miajn infanojn », malgraŭ tio ke li estas fraŭlo k ne havas infanon. Ankaŭ ĉeestis 50-60-jaraj maljunuloj. Antaŭ la kondukatoj marŝis nazmukuloj kun tamburo k trumpeto. Tio allogis multajn scivolemulojn, ĉefe infanojn. En nacisocialista gazeto oni povis legi : « En Berlino voĉdonis mortanto kun bona humoro por Hitler... » Cetere oni venigis kriplulojn, lamulojn, ĉiaspecajn malsanulojn, eĉ idiotojn. Ĉiuj devis voĉdoni, ĉu libervole aŭ ne. Kiu ne povis marŝi, estis portata. Al tiaj personoj oni enmanigis en la balotejo jam pretajn balotilojn. Ĉu tio estas libero ?

Nun la « nazi »-estraro fanfaronas pri la rezulto. Kia rezulto ! En la balotejo, kie voĉdonis mia edzino k mi, la voĉoj por la plebiscito egalis al tiuj por la parlamento ; tamen ni ambaŭ partoprenis la voĉdonon por la plebiscito, sed ne tiun por la parlamento ! La voĉdonilojn por ĉi lasta ni kunportis hejmen. Tiel ankaŭ faris multaj K-doj miaj. En balotejo proksima de mi estis kalkulata nur unu NE-voĉo, sed kvar el miaj K-doj, kiuj tie voĉdonas, asertas esti voĉdonintaj per « ne ». Sed eble ĉiuj Hitleranoj estas analfabetaj k ne scias kalkuli : pro tio, ili simple diras — 95% estas por Hitler.

Alia SAT-ano.

VIA ABONO FINIĜIS ! Multaj trovas kun ĉi tiu n-ro la konatan admonilon; ĝi estu signalo por ili, por iri al la poŝtoficejo k plenigi la ĉekfolion aŭ mandaton adresitan al SAT ! Al nederlandaj K-doj, Federacianoj, ni ne sendas apartan admonilon, ĉar ilia pago koincidas kun tiu al ilia LEA-sekcio. Sed ili pensu ankaŭ pri membreco al la tutmonda asocio k, se eble, pri abono al « Senn. Revuo. » !

ADLEL ? Ne fantomo,
Sed jam konata nomo.

Dum la jaro 1934 fariĝu
vi ankaŭ abonanto al

Sennacieca Revuo

kiu enhavas leterojn k raportojn el la tuta mondo, inkluzive el faŝistaj landoj, verkitajn de niaj K-doj.— Krome valorajn literaturajojn (lab. tendencajn) k sciencajn traktajojn (lingvistiko, ktp). En ĉiu n-ro : « Sub la Sagoj de l'Kritiko » (recenzo pri esperantaj libroj). 16 paĝoj. Ilustrita.

Jarabono : 25 ffr. Estante SAT-ano vi pagas multe malpli altan prezon (vd. la Tarifon en la lasta n-ro)!

Unuopa numero : ffr. 2.25.
SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

Komuniko de la Socialista Frakcio en SAT

Karaj Gek-doj ! Unu el la plej gravaj demandoj dum la XIII-a SAT-kongreso estis tiu pri la skismo inter Socialista Frakcio k ISE. En « S-ulo » n-o 409 vi trovas en la protokolaro la diversajn opiniojn pri tiu afero. En la kunveno de Soc. Frakcio, kiu estis vizitata de ĉ. 120 socialistoj el 14 diversaj nacioj k al kiu la sveda socialdemokrata partio laborista sendis reprezentanton, oni akceptis rezolucion, kiu ankaŭ troviĝas en suprenomita n-o de « S-ulo ». Montriĝis dum la kunveno, ke la K-doj, kiuj simpatiis al la ideo de ISE, forlasis sian starpunkton nedefendeblan k submetiĝis al la tutmonda organizmaniero, kiun reprezentas nia frakcio. Do ni daŭrigu nian socialistan laboron en la kadro de Socialista Frakcio en SAT. Ni atentigas, ke socialistaj esp-istoj, kiuj restas ekster SAT, havas rajton aparteni al nia frakcio.

Kvankam la aneco estas senkotiza, ni estas dankaj por ĉia monsubteno, kian ni povas ricevi de Gek-doj monhavaj. Por tiu celo ni malfermis poŝtĝiran konton n-ro 565 27, sub la nomo Soc. Frakcio SAT, Upplandsgatan 1, Stockholm 1 (Svedio). Do sendu la adresojn de ĉiuj socialist-esp-istaj Gek-doj, kiuj estas aŭ deziras esti anoj de nia frakcio k kolektu iom da mono por niaj necesaj elspezoj. Ni volas atentigi vin, ke pro la situacio en Germanio ni perdis ĉian materialon, kiu koncernas nian frakcion. Pro tio ni ankaŭ petas al la diverslandaj Gek-doj elekti *perantojn* k sendi al nia adreso iliajn nomon k adresojn.

La Socialista Antologio.

Pri tiu verko ni volas rimarkigi, ke ĝi enhavos artikolojn de niaj plej eminentaj socialistaj verkistoj, vivantaj aŭ mortintaj, ekz. J. Ĵores (Jaurès), Emilo Vandervelde, Aŭgusto Bebel, k.a. Niaj sampartianoj en la diversaj landoj estas petataj aranĝi tiel, ke ni kiel eble plej baldaŭ povu disponi la materialon por nia *Socialista Antologio*. Ni deziras po unu artikolon de unu el la ĉefaj socialistaj gvidantoj k po unu artikolon de unu el la junaj teoriuloj. Krome aldonu mallongan biografian noton pri la aŭtoroj k ankaŭ pli rimarkindajn datojn el la vivo de via partio. Ĉiu lando disponos ĝis dudek paĝoj en la libro k la artikoloj aperos en laŭvica ricevo. Faru vian eblon, por ke via lando estu en la unua vico en *Socialista Antologio* ! El Estonio ni jam ricevis promeson pri artikoloj k ankaŭ el Svedio. Ricevinte sufiĉan kvanton ni presos la libron k se ĝi bone sukcesos, ni ankaŭ pretigos *duan* libron. Sciigu al ni, ĉu vi pretas kunhelpi por havigi la materialon !

Atentu ! De la Socialdemokrata Partio Laborista de Svedio ni ricevis subvencion de 300 svedaj kronoj, kiun ni uzos por la preso de la unua libro de Socialista Antologio.

Virina Fako.

Al ĉiuj socialistaj K-dinoj mi alvokas verki mallongan raporton pri la laboro en la socialistaj virinaj asocioj (nombro de l'anaro, gazetoj, ilia nomo, eldonkvanto k.c., labormaniero) laborkondiĉoj en virinaj laborfakoj, speciale virinaj demandoj, kiuj havas ĝeneralan intereson por la legantaro de soc. virinaj gazetoj ; ĉion mi danke akceptas.

Agda Carlsson.

Adreso : Artemisgatan 23, 2 tr., *Vārtan*, (Svedio).

Peranto por Svedio estas K-do Ivar Mattsson, adr. : Magnebergsvägen 51, *Enskede* 2 (Svedio), al kiu oni sendu la adresojn de la svedaj socialistoj, kiuj volas aparteni al Socialista Frakcio en SAT.

(La fratorganoj en aliaj landoj estas petataj represi ĉi supron.)

Por Socialista Frakcio en SAT : *La estraro.*

Kelkaj faktoj pri la "SEKRETA INTERNACIO"

Ĉu estas bezone insisti pri la gravo, kiun havas kontraŭmilita laboro en la hodiaŭa, armilojn vetkure forĝanta mondo ? Ĉe la sojlo de 1934, kuriozaj k timigaj komparoj trudiĝas kun la situacio en 1914. Estu ni sennaciemuloj preparantoj de la spiritoj kontraŭ tiu monstro, kia estas la MILITO k elmontru ni pilorie tiujn, kiuj estas la kulpuloj pri tio, ke la popoloj devas sangadi sur la batalkampoj. Ĉi-sube sekvas iom da materialo por la kontraŭmilita laboro ; kvankam ne ĉio estas freŝdata, tamen ĉiuj citataj faktoj ŝajnas utilaj k sciindaj. Ni atentigas speciale tiujn el niaj legantoj, kiuj ne abonas « Sennacieca Revuo »n, ke en ties decembra kajero ankaŭ estas trovebla interesa kontraŭmilita materialo. — Red.

En la jaro 1921 Komisiono de la Ligo de Nacioj konkludis sian raporton pri la privata fabrikado de armiloj tiele, ke 1) armil-firmoj aktive intrigis per militaj famoj por persvadi « sian landon » apliki militan politikon k pliigi la armilaron ; 2) tiuj firmoj subaĉetis registarajn oficistojn ; 3) ili false raportis pri la militaj programoj de aliaj landoj por tiel stimuli al porarmila elspezado ; 4) tiuj firmoj daŭre influas la publikan opinion per la posedo de la gazetaro ; 5) tiuj firmoj organizis internaciajn trustojn por plifortigi la armilkonkuradon ; 6) ili tiel plialtigis la prezojn por armiloj al la registaroj.

La reĝo de *Afganio*, Amanula, aranĝis ceremonion en Kabulo, post sia vojaĝo tra okcidentaj landoj, en oktobro 1928. Laŭ gazetraporto en « Daily Mail » « la reĝo donis etan resumon pri siaj eksterland-vojaĝoj, emfazante la aĉeton de fabrikaj ekipoj k armiloj. Inter ĉi lastaj li citis 53.500 fusilojn, 106 kanonojn, 6 maŝinpafilojn, 6 tankojn k 5 armitajn ĉarojn. »

En sia nova palaco en Dedinje la gereĝoj de *Jugoslavio* vidis specialan britan filmon faritan de armilfirmo. Montriĝis diversaj tankoj k traktoroj. Ŝipkonstrua firmo montris la eklanĉon[1] de jugoslava militŝipo ; jugoslava ministro k 200 el liaj plej suprarangaj oficiroj ĉeestis tiun filmprezentadon.

Post okmonata esploro, reĝa komisiono eldonis 350-paĝan raporton al la *sveda* Defendministerio. Ĝi el-

[1] Surakvigo.

trovis interalie, ke la komandoro Lubek akceptis 16-mil-kronan subaĉetosumon de iu aeroplana firmo.

La ĉefadmiralo Fuĵi vizitis en marto 1930 la britan armilfirmon de Armstrong k Vikers por ekzameni la kalkulojn por militŝipo mendita de la *Japana Marista Fako*. Li subskribis kontrakton inter ĉi tiu firmo k la japana registaro por 2.367.100 da britaj funtoj sterlingaj. Reveninte Japanion la direktoro de l'nomita firmo sendis al la admiralo ĉiujare dum iu periodo difinitan grandan sumon « por kompensi lian bonkorecon ». Tiu firmo ne estas la sola, kiu tiel rekompencas. La firmo Jaroŭ (Yarrow) agis tute same. Arrol k K[io], ĉe ricevo de mendo por materialo en valoro de ft. 33.621, pagis kompense ft. 1750 en aŭgusto 1912; dum Vier k K[io] en aŭgusto 1911 sendis mil funtojn k tuj poste ricevis mendon por ses pumpiloj k aliaj maŝinoj por batalŝipo.

En 1913 Libkneĥt malkovris skandalon en la germ. Regna parlamento, pri tio ke la firmo Krup (Krupp) dungis eksan artilerian oficiron Brant (Brandt) por akiri la sekretajn paperojn de la registaro pri la armiloj: tiu Brant ricevis kvarmonatan enkarcerigon, dum unu direktoro de la firmo punpagis 1200 mk.

En 1929 tri el la plej grandaj *usonaj* ŝipkonstruejoj, inter ili la Betlehem-ŝipkonstrua korporacio, dungis s-ron Ŝirer (Shearer), usonan publiciston, por malhelpi al la malarmado, kiun pridiskutis la marista konferenco en Ĝenevo en 1927. Pro la fakto, ke liaj estroj ne finpagis lin, li procesis pri sumo de 255.655 dolaroj, ŝuldataj al li. Li konfesis, ke li jam ricevis 51.230 dol. Tiel la afero venis al la taglumo. S-ro S. montris sin en Ĝenevo dum la Malarmada konferenco (1932).

En 1909 s-ro Mulliner de la Coventri-Ordonanco-Kompanio falsinformis al la admiralitato, ke la germana maristaro pliiĝis. Tiu famo atingis la anglan Superan Ĉambron k la marista buĝeto dek tagojn pli poste atingis 35 milionojn, t.e. 2,8 milionojn pli ol en la antaŭjaro.

La dividendoj de la Ŝkoda-fabriko en *Ĉeĥoslovakio* dum la lastaj 10 jaroj parolas elokvente por si mem: En 1920 : 5%; 1921 : 8½%; 1922: 23 : 10%; 1924 : 12½%; 1925 - 13 3-4%; 1926 : 15 3-8%; 1927 . 17 ½%; 1928 : 21 7-8%; 1929 k 30 : 28½%. Tiu firmo estas sub kontrolo de la franca armilfabriko Snejder-Krezo (Creusot) pere de la Eŭropa Bankunuiĝo. En 1931 la hungara registaro pruntis monon de la supra firmo, sed ne povis repagi ĝin. Tiel la franca registaro mem pruntis al la hungara, por ke ĝi repagu al la firmo.

Dum la mondmilito *Turkio* pafis kontraŭ la britaj k aŭstraliaj soldatoj per kanonoj, kiuj estis fabrikitaj en Britio mem. En 1920 Turkio batalis kontraŭ Grekio ĉe Smirno k venkis... per la taŭgaj Krezo-kanonoj, kiuj tutcerte ne estis fabrikitaj ĉe la montosuproj de Horano. La franca parlamento ne aprobis ajnan militan interkonsenton kun Turkio, tamen ĝi ne malhelpis al la komercistoj provizi Turkion per francaj kanonoj, pagotaj post la venko pere de diversaj koncesioj. Oni povas imagi, ke en la oficejoj de l'Orze-Kajo (Eksterlanda Oficejo) oni sciis pri tiuj « privataj » aranĝoj. Tiel la diplomatoj fermis la okulojn al tiuflanka diplomatio, kiu agas ekster la kancelarioj k eĉ estas nekonata al la koncerna parlamento.

Tiaj agoj kreas konstantan malfidon k instigas al pli k pli da armado.

Inter la krudmaterialoj nepraj por la militil-fabrikado estas kelkaj malofitaj metaloj, trovataj nur en malmultaj terpartoj. Tiel nikelo troviĝas en Nova Kaledonio k en Kanado, mangano en Kaŭkazio, ktp. Dum la milito deponaĵo kuŝas en unu aŭ la alia batallando. Eĉ okazas, ke la fabrikado eblas nur en la fabrikoj de la malamikaj landoj, tiel ke interŝanĝo necesiĝas. Tiel armila trafiko daŭras inter la malamikaj landoj eĉ spite furiozanta milito.

Svisio importis germanajn magnetojn por aviadiloj multe pli ol ĝi mem bezonis, same cianamiton ktp. por transporti en Francion. Simile agas Holando k Danio. Ŝajnas strange en batalo por « nacia defendo », ke francia aluminio mortpafas francajn soldatojn, dum germanaj magnetoj mortigas germanojn. La etaj « neŭtralaj landoj » inter la grandaj potencoj estas pli malpli oficialaj kontrabandejoj, k ilia neŭtralo daŭras nur pro ĉi tiu funkcio...

Eltiris k tradukis el broŝuro « La Sekreta Internacio », eldonita de « Unuiĝo de Demokrata Kontrolo », *I. F.*

SAT-anoj en Belgio, anoj de N.F.L.E. !

Ĉar vi kiel anoj de N.F.L.E. pagas jam por " S-ulo-abono ", via kotizo por esti simpla aktiva membro, estas 3.- belgoj jare; aktiva membreco kun ambaŭ revuoj kostas por vi 9.50 belgojn. Bonvolu noti !

POR ŜTOPI LA BREĈON

En la lasta n-ro enŝoviĝis sub ĉi tiu rubriko (26. listo) bedaŭrinda preseraro. La *SAT-anaro de Malmö* donacis ne nur 5. sv. kr., sed **12.50** *svedajn kronojn*. Oni rimarku ĉi tiun **korekton !**

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Ĉu pli naciisma aŭ pli kontraŭsocialisma ?

« Oomoto Internacia » nomiĝas verŝajne tial *internacia* gazeto, ĉar ĝi pledas sur ĉiu paĝo japanan naciisman vidpunkton. Tiel oni legas ekz. en la oktobra kajero : « ... Ni Oomoto-esperantistoj, en la intereso de la tutmonda ekonomio, vokas la atenton de ĉiu sincera amiko de l'progreso (tiel !), kontraŭbatali la mensogan propagandon faritan de nekapablaj industriistoj kontraŭ la japana konkurenco. Malgraŭ la nuntempaj kontraŭaj tendencoj, ni kuraĝas aserti, ke libera komerco estas nepra postulato de prospera mondekonomio ! » Kaj aliloke (pri justa socio) : « ... antaŭ ĉio oni realigu *justan kapitalismon*. Ĉiu klopodo por la enkonduko de komunismo, antaŭ ol la homoj estas sufiĉe evoluintaj por la ebligo de justa kapitalismo, nepre malsukcesos pro la korupteco de l'gvidantoj k la pasiva rezisto de l'popolo. Kaj se oni povas starigi justan kapitalismon, nur frenezulo povus preferi al ĝi sistemon de kazernourboj, « kolĥozoj », k orgion da furorvortaj, spiritmortigaj demagogaĵoj, kiel oni tro bone konstatas ĉirkaŭrigardante... »

Oomoto estas vere bona servanto al la japanaj sinjoroj kapitalistoj; neniam tio montriĝis tiom nude k krude, kiel en ĉi tiu kajero.

Pri nia lingvuzado

ni trovas artikolon en « Pola Esperantisto » (nov.) de S-ro Dreher : « ... Okazis en Krakovo malgranda « universala kongreso » : la 1-a Esperanta Semajno, en kiu partoprenis amaso da Krakovaj k ĉirkaŭkrakovaj esp-istoj. Kiom da ili perfekte majstras nian lingvon ? Estas preskaŭ timige, kiel multe oni — balbutas la lingvon, k ankoraŭ pli terure, kiom da eraroj oni faradas en la uzado de esp-o !... » Kaj poste : « ... Kion helpas, ke aperis 100 novaj esp-istoj, se inter ili ne pli ol unu estas nomebla kiel instruisto ? »

Jen la ĉiama problemo; malgraŭ pli malpli bonaj lerniloj la rezultoj estas malkontentigaj, ĉe ni kiel ĉe la « neŭtraluloj ». Kial ? Ĉar la plimulto da esp-istoj estas nur esperantanoj k ne ekkonas ĝisfunde la gravan rolon, kiun esp-o povas ludi. Estas la manko de konvinko. Praktikado en la kadro de SAT devas gardi la lab. esp-istojn antaŭ la emo konsideri esp-on kiel akcesoraĵon.

Ĉu inda « literaturo » ?

En « Esperanta Literaturo », eldonaĵo de japanaj K-doj (nov.), estas prezentata interalie multe da ekzerca materialo, por perfektigi la legantojn, kun abundaj japanlingvaj klarigoj k komentoj. Sed ĉu la « sprito » de l'sekvanta dialogo estas tiom brila, ke ĝi meritis la presigon? « — Sinjoro, pardonu momenton, ĉar mi volas forĵeti akvon. — Kiun akvon ? — Ha, malpuran akvon. — Malpuran ?... Kie estas malpura ? — En mia ventro ! — ??!! — Ha, ha, ha, mi volas maltrinki. — ??!! — Ĉu vi ne volas iri kun mi ? — Kien ? — Al necesejo. »

Ĉu la Hitlera rasteorio trafis Japanion ?

En « Verda Mondo », unu el la gazetoj de *Oomoto* (nov.), ni legas jenan anoncon : « Virgulino 25-jara, heredanta puran sangon, bela, sana, gradiĝinta liceon, *deziras edziniĝi* al honesta salajrulo de paca hejmo. » Ne tre klare estas, kiun celas la pursangulino : ĉu proleton ne-militeman, aŭ eĉ ne klasbataleman ? Aŭ ĉu la « paca hejmo » simple signifas lokon de materia bonstato ?

Ne fingromontru...

En « Heroldo » de la 26. novembro jena plendkanto de l'ĉefredaktoro : « Kiu asertis tion, ke esp-o malprogresas ?... Ĉu nia afero dependas nur de la fervoro de l'samideanoj en *unu* lando ? Ĉu ĝi dependas nur de registaroj ? Ne ! Unu lando ne estas la mondo... se foje iu

forto pli potenca ol niaj plej strečitaj klopodoj superfortus nin ie ajn, ni pro tio ne pendigu la kapojn... »

Sed kial T.J. parolas tiel *hipoteze* pri kvazaŭ mistera, potenca forto, kiu kontraŭstarus esp-on ? Ĉu tiu malprogresiga potenco do ne estas realajo ?... Se jes, ni fingromontru al ĝi k ne kaŝu la veron : esperanto malprogresadas en diktaturaj landoj ; la verda stelo paliĝas sub la Hokokruco. *N.B.*

ANKORAŬ NUN ESTAS TEMPO

POR ALIĜI al A.D.L.E.L.

(Asocio por Disvastigo de Laborist-tendenca Esperanto-Literaturo) !

Laŭ la kondiĉoj, kiujn vi povis legi en la oktobra n-ro de tiu ĉi gazeto, vi ricevos dum la jaro 1934 du originalajn verkojn de laborist-esperantistaj aŭtoroj k krome du tradukojn de famaj proletendencaj verkoj. Aspekto k eldonmaniero de la libroj estos unuakvalitaj. Ankaŭ vi rajtos ricevi la « Vortaron de Propraj Nomoj en Esperanto » (verkotan) kun tre grava rabato en la fino de la jaro 1934. Entute la abono al la libro-serio signifas 50%-an ŝparon por vi (Ni ja ne dubas pri tio ke vi nepre volos posedi en via biblioteko la eldonotajn librojn !).

Subtenante A.D.L.E.L. vi subtenas SAT k ĝiajn ideojn, vi subtenas la kulturajn aspirojn de la laborista mondo ! Ne hezitu do doni ankaŭ vi vian aliĝon ĉe la sojlo de la nova jaro ! (Tuj pagenda sumo: 20 fr. fr.; por la tuta serio de l'jaro: 50 fr. fr.).

Ununura adreso : Sennacieca Asocio Tutmonda, *23, rue Boyer, Paris XX (por ADLEL).*

Recenzejo

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias

ROBINSON KRUSO. Simpla historieto por komencantoj. Adapto de *Kervran*. Esperantista Centra Librejo, 11, rue de Sèvres, *Paris* 5. Prezo : 1 fr. fr. aŭ resp. kupono. 12 paĝoj. Form. 11 × 16.

Jen la mondkonata aventura historio, treege resumita. Stilaj k lingvaj mankoj (eraroj pri la resenda pronomo sur la p. 5, 6, 11, francismo : « Li iras minaci ») k krome aro da preseraroj bedaŭrinde ne tre rekomendigas tiun ĉi libreton al komencantoj, por kiuj ĝi estas destinita.

BARBRO K ERIKO. Letera romaneto de *Alois Schneider* k *Magda Carlsson*. Eld. Societo Esperanto, Stokholm. 40 pĝ. 13,5 × 20 cm. Prezo : sv. kr. 0.60.

Leterinterŝanĝo inter aŭstra junulo k sveda junulino (geesperantistaj). Kun ilustroj el Aŭstrio k Svedio.

DIALOGOJ K KOMEDIETOJ de EINAR DAHL. Eld. Societo Esperanto, Stockholm. 32 p. 12 × 18,5 cm. Prezo : sv. kr. 0.50.

Teatraĵetoj amuzaj por grupvesperoj, facile prezenteblaj k utilaj por lingva ekzerco.

MURAFIŜO por la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stokholmo (aŭg. 1934). Dukolora.

PROPAGANDAFIŜO de *Ned. Federacio de Lab. Esperantistoj*. Dukolora. Form. 34 × 52 cm. Kun la vortoj (nederl.-lingvaj) : Laboristoj, lernu esperanton ! Atentiga, sed ne tre arta afiŝo.

LJUBLJANA. Esp. gvidfolio tra tiu ĉi jugoslavia urbo. Kun multaj bildoj. Senpage ricevebla ĉe *Esperanta klubo*, Delavska zbornica, *Ljubljana* (Jugosl.).

Ekster nia movado

De la 3.-5. novembro okazis en *Kioto* la 21-a Japana Esp. Kongreso. kiun partoprenis ĉ 500 personoj. La kongreso interalie pridiskutis la problemon pri neologismoj en nia lingvo k akceptis unuanime proteston al la eŭropaj verkistoj pro la senzorga alpreno de nebezonaj neologismoj. Okazis ankaŭ kongresa Universitato (lekcioj pri lingva, instrua temo k homaranismo). Venonta kongreso okazos en Nagasaki.

Mortis unu el la plej malnovaj k spertaj rusaj esperantistoj, aŭtoro de granda « Enciklopedio de Esperanto », pastro *J. G. Sirjaev*. Li aliĝis al esperanto en 1895 k de tiam seninterrompe laboris por la movado, verkante k tradukante.

Neŭtralaj esp-istoj nederlandaj k germanaj aranĝis (22.10) sur germana teritorio (en M. Gladbaĥ) internacian limkunvenon, kiu staris en signo de scienca laboro (lekcioj, vizito al geologia muzeo, ks.).

Nordbohemaj esperantistoj (ARE) kunvenis la 5.11. en *Trnovany (Turn)*, Ĉeĥoslovakio (norda limregiono). 41 p. el 15 lokoj. Ili pridiskutis organizajn problemojn (pli firman kontakton kun la landa centro).

Internacia Radio-Servo (Esp-a) sciigas, k ĝis nun *ne estis eble gajni iun ajn sendstacion en Germanio*, por denove disaŭdigi esperantajn dissendojn. Tamen unu grava radiogazeto denove publikigis la esp. disaŭdigojn de la eŭropaj sendstacioj, *kiuj estis forstrekitaj antaŭ kelkaj monatoj*.

Memornoto

REPRESIS EL « SENN. REVUO » : *Weekly People*, Novjorko, 18.11. (let. el Germ., ekstrakte).

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS : *De Fakkel, Amsterd.* 28.11., 5.12. *Signalen*, Stokh., 9.11. (pri ADLEL), 16., 23., 30. 11., *Le Jeune Prolétaire*, Paris, okt. (pri la 2 SAT-Kongr.), *La Voix Libertaire*, Limoges, 18.11., *Le Travailleur*, Belfort, 18.11., *Brand*, Stokh. (en esp-o pri Ozere), 30.9., *Arbederbladet*, Oslo, 8.9.

La estraro de l'Marsejla Laborborso akceptis aperigi « Labor. Esperantistan Tribunon » en *Midi Syndicaliste*, ĉiusemajna organo de l'Ĝener. Sindik. Konfederacio en la Marsejla regiono. Peresp-an rubrikon aperigos regule dusemajne nova anarkista gazeto en Parizo *(L'Action Libertaire)*.

Radio-Programo

25.XII : 22.15-23.00, Brno, 342 m, Praha, Bratislava k.a. ĉeĥosl. stacioj : kristnaska amuzhoreto.

26.XII : 21.30-22.35, Leningrado, 1304 m, radio-dramo Galileo.

27.XII : 22.00-22.20, Warszawa, 1411,8 m k relajoj, memhelpo de blinduloj.

30.XII : 15.45-16.00, Tour Eiffel, 1445 m, turismo (*same :* 6.1.34).

31.XII : 01.00 nokte, London k relajoj, novjarsaluto ankaŭ en esperanto.

6.1.34 : 17.15-17.25, Brno, 342 m, parolado.

7.1.34 : 10.10-10.30, Stockholm, 435 m, Motala k relajoj, L. Sinka pri Svedio.

Korespondado

ĈEĤOSLOVAKIO.

K-do *Alois Hales*, 21, Ciĥlarska, *Brno*, dez. kor., ankaŭ angle, germ., itale, hispane, speciale kun anarkistoj ; serĉas portugalon por lerni port. perletere ; PM, PI, L.

K-do *Josef Wuchtert, Holeischen* 127 (ap. Plzen). Kiu sendos al mi 50-100 div. PM de sia lando, ricevos de mi saman kvanton el ĉeĥaj. Tuj resp. al ĉiuj.

FRANCIO.

Gelernintoj el lab. grupo dez. kor. kĉl. Skribu al K-do *Langlois*, 25, Bd. Jules-Guesde, *Saint-Denis*, Seine.

SVEDIO.

20 geknaboj 11—15-jaraj dez. kor. kun samaĝuloj. Respondu al : K-dino *Svea Jõnsson*, Mon Bijougatan 6.B, *Malmõ*.

La Unuiĝo de Esperantistaj Virinoj (U.D.E.V.), kiu laboras por justo, paco k virinrajtoj, petas vian aliĝon. Kotizo ne deviga, sed kiu povas, subtenu ankaŭ per mondonacoj niajn laborojn. En dek eŭropaj landoj sekcioj estas fonditaj. Sekretariino-kasistino por Nederlando estas : *Marie E. Gillay*, Parkweg 99, *Voorburg* (ĝiro 68 587). Nia franca sekret. : *S-ino M. Borel*, 1, Quai Claude-Bernard, *Lyon*, skribas i.a. sub titolo « Al miaj Fratinoj :

« ... Disigitaj de miljaraj baroj, ni ne povis ĝis nun interŝanĝi niajn pensojn k pro tio ni estis tre facile trompataj de nescio. Nescio fariĝas krimo, kiam ĝi permesas abomenaĵon kiel milito... Ni submetiĝis al milito, same kiel niaj prapatrinoj submetiĝis al pesto aŭ ĥolero. Nun per higieno ni scias defendi nin de tiuj malsanoj ; kontraŭ la plej terura, la milito, ni nun ekvidas la rimedon : kontraŭ milito—*higieno*... de la koro, ĉefe de la patrinaj koroj ; ... ni alvokas vin al kuracado... ĝi urĝas... Per esp-o ni unuiĝu super la limoj trapenetreblaj per nia amo ; donu vian manon, ni laboros kune... ni starigos ĉirkaŭ la Tero ĉenon el patrinaj koroj, venkontaj por ĉiam la Timon, kiu naskas Militon.

Ni atentigas, ke, kiel antaŭvidite, la JARLIBRETO aperos en januaro k estos dissendata nur al la membroj kun la januara numero de "S-ulo".

En viaj korespondaĵoj al la Administracio bonvolu ĉiam citi vian membronumeron !

Dum vintraj vesperoj flegu la Kanton !

Plej belajn laboristajn kantojn tradukitajn el 22 lingvoj oni trovas *kun musiknotoj*

en la unika

Proletaria Kantaro

180 paĝoj. SAT-eldono. Prezo- 12 fr. fr.

SAT, 23, rue Boyer, Paris 20.